



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 2/2000

Majo/květen 2000

Avignon, samkiel Prago, estas ĉi-jara Eŭropa Urbo de Kulturo. La prezidantino de la Esperanto-Grupo en Avignon s-ino Simone Humm estis jam kelkfoje en Prago kaj tre interesiĝas pri la ĉeĥa historio. En la jara bulteno de la porinstruistaj lernejoj en Mirecourt kaj Epinal ŝi aperigis artikolon pri la ĉeĥa historio kaj pri la estiĝo de la ĉeĥoslovaka armeo dum la 1-a mondmilito en Francio. Ŝian artikolon esperantigis ŝia samklasano s-ro Gilbert Thomas kaj el tiu ĉi artikolo ni prezentas fragmenton pri la ĉeĥoslovaka armeo en Francio.

Simone Humm

Ĉu Ĉeĥoslovakio naskiĝis en urbo Darney?

La urbeto Darney situas en departemento „Vogezoj“, 30 kilometrojn de Epinal, la ĉefurbo de la departemento. En Darney estas monumento, kiu rememorigas la naskiĝon de la sendependa ĉeĥoslovaka ŝtato kaj en la loka kastelo situas franca-ĉeĥoslovaka muzeo. Kiel rilatas Darney kun Ĉeĥoslovakio?

Kiam en la jaro 1914 eksplodis la unua mondmilito, vico da patriotoj elmigris. Inter ili 65-jara profesoro Masaryk alvenas en Parizon kie li fondas organizaĵon kiu celas liberigi la ĉeĥojn el la aŭstra premateco. Profesoro Masaryk kaj lia kunlaboranto Edouard Beneš

estas helpitaj de Milan Štefánik,

Avignon, stejneĵe jako Praha, je letos Evropským městem kultury. Předsedkyně esperantského klubu v Avignonu pí Simone Hummová byla už několikrát v Praze a velice se zajímá o české dějiny. V ročence učitelských škol v Mirecourtu a Epinalu uveřejnila článek o českých dějinách a o vzniku československé armády za 1. světové války ve Francii. Její článek přeložil do esperanta její spolužák p. Gilbert Thomas a z tohoto článku přinášíme výňatek o československé armádě ve Francii.

Simone Hummová

Zrodilo se Československo v městě Darney?

Městečko Darney leží v departementu „Vogézy“, 30 km od Epinalu, hlavního města departementu. V Darney je památník, připomínající zrození nezávislého československého státu a v místním zámku je francouzsko-československé muzeum. Jak souvisí Darney s Československem?

Když v roce 1914 vypukla první světová válka, řada vlastenců odešla do zahraničí. Mezi nimi 65-letý profesor Masaryk přichází do Paříže, kde zakládá organizaci, jejímž cílem je osvobodit Čechy od rakouského útlaku. Profesoru Masarykovi a jeho spolupracovníku Eduardu Benešovi pomáhá Milan Štefá

- slovako, iama universitata studento de Masaryk. Li laboras en la franca admistracio en kiu li havas rangon de generalo. Li persvadas la francajn aŭtoritatojn por ke ili laboru por la liberigo de la ĉefia kaj slovakaj popoloj. Oni ŝuldas al li la ideon unuigi la destinojn de la ĉefia kaj slovakaj popoloj.

Kaj nun intervenas la urbeto Darney. Kiel?

1) La 19an de decembro 1917, Poincaré kaj Clemenceau permesas la kreadon de ĉefia kaj slovakaj armeoj en kiu partoprenas la ĉefiaj kaj slovakaj volontuloj venintaj el Italio, Rumanio, Rusio, Usono, kien ili fuĝis por ne batali kun Aŭstrio. Ili strukturas la 21an kaj 22an regimentojn kiuj loĝas en Darney sur altebenaĵo kiu poste estos nomata „Camp Kleber“.

2) La 29an de junio 1918, la franca registaro agnoskas la rajton de ĉeĥoslovakaj strukturi „sendependan, suverenan ŝtaton“. Tiu ŝtato sin lokos en la historiaj limoj de la du reunuigintaj provincoj.

3) La 30an de junio 1918, la franca prezidento Raymond Poincaré, pluraj ministroj kaj delegitoj de la Alianco agnoskas Nacian Konsilion kiel suverenan ĉeĥoslovakon registaron. La ceremonio okazas en Darney en la Seesto de la volontuloj kiuj ĵuras fidelecon al sia nova nacia flago, flago donacita de la pariza urbestro kaj transdonita de Raymond Poincaré en ĉeesto de Edouard Beneš.

4) La 28an de oktobro 1918, la Nacia Komitato proklamis la sendependan Ĉeĥoslovakon Ŝtaton kaj la 14an de novembro 1918 la Nacia Asembleo proklamis Ĉeĥoslovakon Respublikon kaj elektis Masaryk prezidento.

5) La 9an de decembro 1918 Masaryk forlasas Usonon kaj alvenas en Darney. Tie, kiel ŝtatestro, li revuas unuafoje la regimentojn kiuj akklamas lin kiel Prezidento-Liberiginto.

6) Kelkajn tagojn poste, Masaryk kiel

prezidento triumfe venas Pragon.

nik, Slovak, nekdeĵi univertzitni student Masarykuv. Ŝtefaniĝ pracoje ve francouzské správě, kde má hodnost generála. Přesvědčuje francouzské představitele, aby pracovali pro osvobození českého a slovenského lidu. Je tvůrcem myšlenky spojit osudy českého a slovenského národa.

A nyni vstupuje do děje městečko Darney. Jak?

1) 19. prosince 1917 prezident Poincaré a předseda vlády Clemenceau svolují vytvořit českou a slovenskou armádu, v které se účastní čeští a slovenští dobrovolníci, kteří přišli z Itálie, Rumunska, Ruska, USA, kam utekli, aby nemuseli bojovat na straně Rakouska. Stávají se členy 21. a 22. pluku, které budou ubytovány v Darney na výšině, později zvané „Camp Kleber“.

2) 29. června 1918 francouzská vláda uznává právo Čechoslováků vytvořit „nezávislý, svrchovaný stát“. Tento stát bude v historických hranicích jeho dvou spojených částí.

3) 30. června 1918 francouzský prezident Raymond Poincaré, několik ministrů a delegátů aliance uznávají Národní radu jako svrchovanou československou vládu. Obřad se koná v Darney v přítomnosti dobrovolníků, kteří přísahají věrnost své nové národní vlajce, vlajce věnované pařížským primátorem a předané Raymondem Poincarém v přítomnosti Eduarda Beneše.

4) 28. října 1918 Národní výbor vyhlásil samostatný československý stát a 14. listopadu 1918 Národní shromáždění vyhlásilo ČSR a zvolilo Masaryka prezidentem.

5) 9. prosince 1918 Masaryk opouští USA a přichází do Darney. Tam, jako hlava státu, přehlídí poprvé pluky, které ho zdraví jako prezidenta Osvoboditele.

6) O několik dní později Masaryk jako prezident triumfálně přijíždí do Prahy.

Sed denove ni reiru en Darney:

Inter la du militoj, la ĉefurbestro-senatoro de Darney, s-ro Barbier proponas la ideon krei muzeon kiu memorigus la historiajn agojn, kaj samtempe konstrui monumenton sur la loko „Camp Kleber“. Prago kaj Parizo ofertas sian helpon. En jaro 1937, la franca Parlamento unuanime aprobas elspezon de 500.000 frankoj por konstrui piramidon el betono 32 metrojn alta kies inaŭguro estis antaŭvidita la 30an de junio 1938. Gravaj eventoj vundis Ĉeĥoslovakion en 1938... Tial la inaŭguro ne povis okazi. Du jarojn poste, la germana armeo invadis Francion. La monumento estis detruita de la germanoj la 18an de novembro. Ili ŝtelis la „Oran libron“ de la legianoj en 1941. Post la milito ĝi estis malkaŝita. Poste, ĝi retrovis sian lokon en la muzeo.

Tiu muzeo riĉiĝis per novaj memoraĵoj: fotoj, pentraĵoj, manuskriptoj, leteroj skribitaj de legianoj senditaj al loĝantoj de Darney, statuo de Štefánik, ministro en lia lando. Samtempe, oni planis la rekonstruon de la detruita monumento. Spite la monajn problemojn la rekonstruo sukcesis, kaj en jaro 1968, okaze de la 50a datreveno, la dua monumento estis inaŭgurita. Ĝi konsistas el metala sago kiu staras sur piedestalo el betono. Sur tiu soklo estas skribitaj pensoj de Poincaré, Masaryk kaj Beneš, kaj la fiera devizo de la husanoj: „La Vero Venkos“.

En 1998 estis memorfestita la 80a datreveno de la naskiĝo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Tio okazis en Darney, same kiel en Prago.

Tiuj historiaj eventoj okazis en Darney antaŭ ol ili okazis en Prago: tial estas prave diri ke Francio, kaj ĉefe la vojeza regiono kaj Darney, estas vere la naskiĝloko de la Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Tradukis Gilbert Thomas

F5NAQ

Avŝak zнову se vraťme do Darney: Mezi dvěma válkami hlavní starosta - senátor Darneye p. Barbier navrhuje vytvořit muzeum, které by připomínalo historické činy, a zároveň vybudovat památník na místě „Camp Kleber“. Praha a Paříž nabízejí svou pomoc. V roce 1937 francouzský parlament jednomyslně schvaluje výdaj 500 000 franků na stavbu pyramidy z betonu 32 metrů vysoké, jejíž inaŭgurace je očekávána 30. července 1938. Závažné události zranily Československo v roce 1938... Proto se inaŭgurace nemohla konat. Po dvou letech německá armáda vpadla do Francie. Památník zničili Němci 18. listopadu. V roce 1941 ukradli „Zlatou knihu“ legionářů. Po válce byla objevena. Později našla své místo v muzeu.

Toto muzeum se obohatilo o nové památky: fotografie, malby, rukopisy, dopisy legionářů psané obyvatelům Darney, socha Štefánika, ministra své země. Zároveň se plánovala rekonstrukce zničeného památníku. Přes peněžní problémy rekonstrukce byla úspěšná a v roce 1968, u příležitosti 50. výročí, druhý památník byl otevřen. Sestává z kovového šípů, který stojí na podstavci z betonu. Na tomto podstavci jsou napsány myšlenky Poincarého, Masaryka a Beneše a hrdé heslo husitů: „Pravda zvítězí“.

V roce 1998 bylo slavnostně vzpomenuo 80. výročí zrození Československé republiky. To se konalo v Darney, stejně jako v Praze.

K těmto historickým událostem došlo v Darney dříve než v Praze: proto je správné říci, že Francie a hlavně vogézský kraj a Darney jsou skutečným rodištěm Československé republiky.

Esperantský překlad Gilbert Thomas,
radioamatér, zn. F5NAQ
Český překlad Jiří Patera

Jaroslav Hašek

Joêjo Nový rakontas pri la fiançiĝo de sia fratino

Mia patro estas supera ŝtata oficisto kaj nomiĝas Nový. Mia fratino nomiĝas Matilda. Ŝi edziniĝis ankaŭ al ŝtata oficisto. Tiu nomiĝas Hsndšlág.

Plej frue mia fratino rendevuis kun iu sinjoro de gubernia oficejo. Paĉjo prizorgis, ke tiun sinjoron oni rangaltigu. Post kiam oni rangaltigis lin, panjo kun Matilda ploris, ĉar tiu sinjoro ĉesis post tio kun Matilda rendevui.

Poste venadis al ni iu profesoro. Tiu konstante gestis per la manoj jene, jene, kaj post ĉiu dua vorto li diris:

"Rigore konsiderante." Foje li alportis al mi globuson, kaj post kiam li ĉesis venadi al ni, li sendis por ricevi ĝin.

Post la profesoro rendevuis kun Matilda iu inĝeniero el la landa komitato. Tiu havis kutimon senĉese disputi kaj diradis: "La intereso de la lando tion volas." Matilda lin tre amis kaj ploris tutan tagon, kiam paĉjo eljetis lin de ni, ĉar li volis, ke mono restu en la lando kaj ne estu sendata en Vienon.

Poste la patro venigis al ni iun oficiston el sia fako. Tiu estis tia silentema homo. Ili kune babilis longe ĝisnokte pri ŝtataj aferoj.

Matilda brodis kaj paĉjo kun tiu sinjoro parolis pri politiko kaj trinkis akvon.

Matilda tiun silenteman sinjoron tre amis. Poste evidentiĝis, ke tiu silentema sinjoro havas tri infanojn en Moravio. Li venis neniam plu kaj paĉjo diris, ke oni translokigis lin.

Duonjaron vizitadis nin neniuj. Matilda rendevuis, por ke hejme oni tion ne sciu, kun iu oficiro.

Poste paĉjo malkovris tion kaj parolis al ŝi, ĝis ŝi ruĝiĝis. Post tio ni ĉiuj ploris, ĉar paĉjo diris: "Kia honto, kia honto!"

Tuj la sekvintan tagon venigis paĉjo ian maldikan homon, kaj li estas ĝuste tiu Handšlág. Paĉjo diris post lia foriro, ke li estas tre talenta homo. Post ĉiu vorto li diris: "Mankison, moŝta sinjorino konsilant-edzino!" kaj al paĉjo li diris: "Via moŝto, sinjoro konsilanto!" Paĉjo estas lia ĉefo. La trian tagon li venis denove kaj estis konstante tia respektoplena, senĉese li diris "bonvolu permesi" kaj "moŝta sinjorino" kaj kisis la manojn. Li vespermanĝis ĉe ni, al ĉio kion paĉjo diris, li kapjesis, ĉiun manĝopecon li glutis respekte kaj silente li maĉis dirante: "Ĝi estas, bonvolu permesi, eminenta!" Li ankaŭ diris: "Kiel vi bonvolas ordoni, sinjoro ĉefo!"

Post lia foriro ili diris al mi, ke mi iru dormi, kaj interkonsiliĝis en la manĝejo. Mi aŭskultis post la pordo, kiel mi faras ĉiam, kaj aŭdis, kiel paĉjo diras: "Vi edziniĝos al li laŭ mia patra ordono kaj li edziĝos al vi laŭ la ofica devo!" Post tio mi aŭdis, ke Matilda diras, ke li estas idioto.

Panjo suspiris kaj diris, ke komence ŝi ne devas ami lin, ŝi fraŭline ankaŭ ne amis paĉjon, nur kvin jarojn post la nupto, sed ke al tiu ŝlemilo ŝi ne rajtas konigi, ke li estas idioto kaj ke ŝi ne amas lin.

Matilda diris, ke ŝi prefere pasigos tempon en akuŝejo ol edziniĝi al iu, kiun ŝi ne amas. Sed panjo deturnis ŝin de tiu intenco, ĉar nun ne plu estas sekreta separeo.

Post tio paĉjo promesis al Matilda braceleton, briliantan broĉon kaj ankoraŭ aliajn aĵojn.

Matilda diris, ke ŝi do edziniĝos al li, por ke ne estu hontindaĵo en la familio.

Poste paĉjo kaj panjo kisis ŝin kaj diris: "Tio estas nia bona Matilda."

Post tio mi aŭdis, kiel ili parolis pri Handŝlág. Paĉjo diris, ke tiun idioton li rangaltigos, sed nur post la edziĝfesto, por ke li ne povu fuĝi aŭ elgliti. Li estas stulta, sed alikaze honora oficisto, por kiu la ofica devo estas sankta.

"Nur se li edziĝos al ŝi," diris panjo.

"Mi ordonos tion al li kiel lia ĉefo," parolis paĉjo, "kaj mi diros al li ĉion."

Kiam la sekvintan tagon sinjoro Handŝlág venis, li kondukis tre nekuraĝe kaj konstante observis Matildan. Al Matilda ili antaŭe diris, ke ŝi multe ridu al li kaj babilu al li. Ŝi obeis kaj li konstante silente respondis: "Jes, moŝta fraŭlino." Poste ili alportis vinon, li sorbetis iom kaj diris: "Bonvolu permesi, sinjoro ĉefo!" kaj komencis paroli pri oficaj registroj. Tiun tagon ili parolis pri li nenion, post kiam li foriris.

Sekvatage diris paĉjo en la loĝoĉambro, por ke mi tion ne aŭdu: "Hodiaŭ venos mia oficisto peti vian manon. Matilda, surmetu rozeton sur bluzon!" Servistino iris aĉeti rozeton kaj panjo koleris, ke ŝi povis ne aĉeti rozojn por tridek krejceroj, ke sufiĉis ankaŭ por dek kvin. Poste ili Matildan parfumis. Per la resto de la parfumo mi ŝmiris nian hundon.

Sinjoro Handŝlág venis en nigra vesto kaj en blankaj gantoj. Li estis ankoraŭ pli pala kaj pli maldika ol hieraŭ. Post kiam li sidiĝis, li parolis denove pri registroj. Panjo alportis likvorbotelon kaj verŝis al li tri glasetojn. Kiam ŝi estis verŝanta la kvaran, li diris: "Jam sufiĉas, moŝta sinjorino," kaj al paĉjo li diris: "Mi petas, sinjoro ĉefo, privatan interparolon."

Paĉjo montris al mi per fingro al pordo: post tio foriris panjo al Matilda, kiu oscedis apude en la ĉambro kaj diris: "Tiu fuŝulo longe prokrastas la geedziĝon!" Panjo ankoraŭ repudris Matildan kaj en tiu momento estis

aŭdebla la voko de paĉjo: "Matilda!"

Mi starigis min al la pordo kaj aŭdis paĉjon diri: "Kara Matilda, jen sinjoro Handŝlág petis de mi vian manon. Mi ne estas kontraŭ, sed la ĉefa aganto estas vi. Kion vi opinias pri tio?"

Mi aŭdis, ke Matilda ploras kaj diras: "Jes, jes!" Poste mi aŭdis: "Panjo!" Panjo alkuris kaj diris: "Infanoj, mi tuj rimarkis tion ĉe vi. Kiel bele tio konvenas al vi!" Post tio ili kriis: "Joĉjo!" Mi venis kaj tiam ili diris al mi, ke sinjoro Handŝlág edziĝos al Matilda. Panjo demandis min, ĉu mi ŝatos lin. Mi ne povis diri, ke ne, kaj li kaptis min, kisis kaj kriis: "Joĉjo de sinjoro ĉefo!" Ekde tiu tempo li diris al paĉjo: "Bonvolu ordoni, sinjoro ĉefo kaj patro" kaj al patrino: "Mankison, moŝta sinjorino kaj panjo!"

Kiam li estis foriranta, li donis en la antaŭĉambro oran moneron al servistino kaj al mi kronon kaj diris: "Jen havu, Joĉjo de sinjoro ĉefo!"

La sekvintan tagon sinjoro Handŝlág alportis ringojn kaj kiam venis la vico de vino, li levis la glason kaj diris: "Je nia feliĉa geedzeco, bonvolu permesi, sinjoro ĉefo patro kaj moŝta sinjorino kaj panjo!"

"Estu feliĉaj, infanoj!" diris panjo kaj ploris. Kiam pli poste Matilda lin akompanis en la antaŭĉambro, tiam ili elpelis min el la ĉambro, kaj panjo diris al paĉjo: "Matilda akuŝos en novembro, tio estas post du monatoj."

"Post unu monato estos la geedziĝa festo," diris al tio paĉjo, "kaj post tio ni nur tiam donos al li la dekretan, ke li avancis..."

Poste venis Matilda kaj diris, ke tiu idioto volis de ŝi kiseton.

"Kia aŭdaco!" konstatis panjo.

"Sed li estas honesta oficisto!" diris paĉjo.

Tradukis Jiří Patera

Membrino de nia klubo kaj la dum-viva membro de CEA s-anino Libuše Bláhová forpasis la 12an de februaro 2000 en la aĝo de 79 jaroj. Honoron al ŝia memoro!

85. světový kongres esperantistů

Letošní 85. světový kongres se bude konat v Tel Avivu od 25. 7. do 1. 8. 2000. Předkongres bude uspořádán v Ammánu v Jordánsku. Dodejme, že 86. světový kongres se bude konat v Záhřebu v roce 2001 a 87. kongres bude v městě Fortaleza v Brazílii v r. 2002.

Esperantská ulice v Přerově

Městská rada v Přerově se koncem loňského roku rozhodla pojmenovat jednu z nových ulic ve čtvrti Čechovice jménem „Esperantská“. Blahopřejeme přerovským a závidíme jim, protože v Praze nám už před lety bylo slíbeno, že některá nová ulice dostane název „Esperantská“, ale dosud se tak nestalo.

Velký úspěch esperantského slovníku

V 6. ročníku soutěže o titul „Slovník roku 1999“, kterou uspořádala Jednota tlumočnicků a překladatelů, se na velmi pěkném 8.-9. místě umístil Česko-esperantský slovník Karla Krafta spolu s Rusko-slovenským frazeologickým slovníkem. Dobré umístění Česko-esperantského slovníku, který vydala firma KAVA-PECH v Dobřichovicích, je tím výraznější, že do soutěže bylo přihlášeno celkem 84 různých slovníků.

Česko-esperantský slovník (K. Kraft) se svým rozsahem 16 + 491 stran řadí mezi střední slovníky, stejně jako Esperantsko-český slovník (K. Kraft, M. Malovec), který má 21 + 239 stran. Ve světě však vycházejí slovníky většího rozsahu, např. Italsko-esperantský (C. Minnaja, 1438 str.) nebo Maďarsko-esperantský (I. Szerdahe-lyi, I. Koutný, 12 + 835 str.). V loňském roce vyšly dva velké slovníky, a to Esperantsko-německý (E. D. Krause, 14 + 882 str.) a Vietnamsko-esperantský (Nguyen Minh Kinh, 20 + 1412 str.).

Balíčky pro uprchlíky

Světový esperantský svaz (UEA) na zvláštním kontě Espero shromažďuje finanční prostředky na pomoc obětem válek, především esperantistům. V souvislosti s kosovskou krizí bylo z tohoto konta zapláceno dva tisíce balíčků po 50 německých markách, které obsahovaly základní potraviny a hygienické potřeby. Akci zorganizovala zvlášť zřízená Humanitární organizace Espero v Bosně po dohodě s místním Ministerstvem pro uprchlíky. Akce pokračuje dále, příspěvky na konto Espero jsou stále vítány.

Esperantista na známce

Nizozemská pošta vydala koncem roku 1999 desetiznámkový blok s názvem „Vrcholy 20. století“. Na jedné známce je zobrazen Willem Drees (1886-1988), někdejší ministr sociálních věcí a předseda vlády Nizozemska. Byl architektem sociálního systému země. Znal esperanto a ve svých pamětech věnoval mezinárodnímu jazyku celou kapitolu. Převzal záštitu nad 39. světovým kongresem esperantistů v Haarlemu (1954) a řadu let byl členem Čestného výboru UEA.

Qexteto Esperanto

mělo premiéru koncem října 1999 v Trenčíně. Je pokračovatelem někdejšího Kvarteta Esperanto, které vystupovalo v 70. letech a uvádělo písničky v esperantu nejen doma, ale i v zahraničí. Později byla činnost kvarteta zakázána a jeho vedoucí Bohuš Hanzel emigroval do Švédska. Po sametové revoluci se někdejší hudebníci a zpěváci opět sešli a protože všichni pracují ve firmě Q-EX B. Hanzela v Trenčíně, nazvali novou skupinu -Qexteto Esperanto. Jejich první CD pokřtil hudebník Pavol Hammel.

Rádio Polonia, Varšava

vysílá v esperantu denně od 15.30 do 15.55 hod. našeho letního času na krátkých vlnách v pásmu 41 m (7275 a 7285 kHz), tento pořad je opakován třikrát: od 20.00 do 20.25 hod. na krátké vlně 41 m (7205 kHz) od 21.00 do 21.30 hod. pouze na satelitu Eutelsat II F6 13 (Hot Bird) a následující den dopoledne od 10.30 do 11.00 hod. na satelitu Eutelsat (jako večer). Toto vysílání je možno zachytit také na Internetu po celý den:

www.wrn.org/stations/poland.html

Adresa stanice: Rádio Polonia, Esperanto-Redakcio, P O.Box 46, 00-977 Varsovio, Polsko

Eliška Krásnohorská

Letěla bělounká holubička

Letěla bělounká holubička,
potkala božího andělíčka.
Duše z těla, kam jsi chtěla?
Chtěla jsem doletět do nebíčka.

Dolet' si, dušinko, až do nebe,
já půjdu k děťátku místo tebe;
tam je zlíbám, ukolíbám:
líbá tě nastokrát tvá matička.

Porovnání dvou různých překladů

Jan Neruda

Matiče

V sobě jen a mlčky nesu,
necht' zakusím čehokoli,
zamlčím i matce drahé,
co mne těší, co mne bolí.

Jak to přijde, matičko má,
že přec všechno uhodnete -
když mně srdce v těle plesá,
zrak že jasně pozvednete?

Jak to přijde, matičko má,
že tak všechno uhodnete, -
když mně srdce v těle pláče,
že si v koutek zasednete?

Jan Neruda

Al la patrineto

Tutan ĝojon kaj doloron
mi travivas en sekreto:
mi interne en mi kaŝas
ĉion antaŭ patrineto.

Panjo mia, kiel eble
ke vi ĉion tuj ekscias?
Kiam ĝojas mia koro,
la vizag' al vi radias.

Kiel, mia patrineto,
nur vi ĉion kun mi sentas?
Se ploregas mia koro,
en angulo vi silentas.

Jan Neruda

Al la patrineto

Ĉiun senton nur silente
portas mi en mia koro,
eĉ la panjon mi sciigas
nek pri ĝoj' nek pri doloro.

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi tamen ĉion vidas -
kiam ĝojas mia koro,
ke okuloj viaj ridas?

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi ĉion klare vidas -
kiam ploras mia koro,
ke vi en anĝul' eksidas?

Trad. Rudolf Friedrich

Trad. Miloš Lukáš

Karel Sabina

Proč bychom se netěšili

Proč bychom se netěšili,
když nám pánbůh zdraví dá?
Kdož z nás ví, zda pouť budoucí
vesele tak uhlídá?

Proč bychom se netěšili,
když nám pánbůh zdraví dá?
Jenom ten je vpravdě šťastný,
kdo života užívá.

Karel Sabina

Kial nune ni ne ĝoju

Kial nune ni ne ĝoju,
kiam sanon donas Di'
kiu scias, ĉu estonte
ree ĝoji povos ni.

Trad. Jan Filip

Karel Sabina

Kial ni ne devu ĝoji

Kial ni ne devu ĝoji,
dum la sanon donos Di'?

Kiu scias, ĉu post jaro
same ĝoji povos ni?

Kial ni ne devu ĝoji,
dum la sanon donos Di'?

Sole kiu gaje dancas,
veran vivon konos li!

Trad. Tomáš Pumpr

Eliška Krásnohorská

Flugis kolombinet'

Flugis kolombinet' de blanka bel',
voje ĝi renkontiĝis kun anĝel':
„Homa anim', ĝis kia lim'?"
„Volas mi flugi ĝis al la ĉiel'."

„Flugu, ho animet', al ĉielsfer',
mi iros al via infan' sur ter',
lulos mi ĝin - kiel patrin':
Kisas vin centfoje panjo en ver'."

Trad. Jan Filip

Eliška Krásnohorská

Blanka kolombo

Blanka kolombo forflugas de l' ter'.
„Kien vi celas?" ĝin petas anĝel'.
„Mi, animo de patrino,
volas forflugi ĝis alta ĉiel'."

„Flugu sen timo plu, flugu sen tim',
kaj ĉe la ido alternos mi vin.
Mi lin vartos, li bonfartos,
kvazaŭ lin kisas mem lia patrin'."

Trad. Tomáš Pumpr

Rádío Vaticana

vysílá esperantské desetiminutovky takto:
o nedělích a církevních svátcích
od 21.20 do 21.30 hod. na středních vlnách
569 m a 196 m (527 a 1530 kHz) na krátkých
vlnách 75 m a 49 m (4005 a 5880 kHz) a na
satelitu INTELSAT 325,5 0 East (Atlantic)
4097,75 MHz - LHCP polarization tento pořad
je opakován týž den od 23.50 do 24.00 hod. na
stejných vlnách, avšak bez satelitu ve středu a
ve čtvrtek

od 21.20 do 21.30 hod. na střední vlně 186 m
(1611 kHz), na krátkých vlnách 41 m a 31 m
(7250 a 9645 kHz) a na satelitu INTELSAT 62°
East (Indián) 4097,100 MHz - LHCP
polarization.

Všechny časové údaje podle letního času.

Adresa stanice: Rádío Vaticana, Esperanto-
redakcio, Piazza Pia 3, SCV-00120 Città del
Vaticano, Itálie.

Esperantská redakce Vatikánského rozhlasu
obdržela v r. 1999 celkem 828 dopisů (v roce
1998 to bylo 717 dopisů).

Placeno v hotovosti

Novinová zásilka

BULTENO nepravidelný věstník

Vydává Klub esperantistů v Praze

pošt. schr. 1069, 111 21 Praha 1

Podávání novinových zásilek povolila

Česká pošta, s. p., Odštěpný závod Praha

čj. nov 6127/96 ze dne 23. 10. 1996.

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuvendrede de la 14.00 h gis la 16.00 h por pensiuloj kaj de la 16.00 h gis la 18.00 h por la laborantaj geesperantistoj. La kunvenoj okazas en la Societa Centro en la Malnova Urbo, Rybná str. n-ro 25/27.
--

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý Pátek od 14.00 do 16.00 hod, pro důchodce a od 16.00 do 18.00 hod. pro pracující esperantisty. Schůze se konají ve Společenském středisku na Starém Městě, Rybná ul. č. 25/27.
